Decembro 1955 Jarkolekto 52 No. 453

ESPERO KATOLIKA

XXVIa INTERNACIA KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ.

Dum Nia XXVa en 1954 en Amsterdamo la Katolika Hispana Esperantista Asocio akceptis aranĝi en 1956 nian kongreson en Barcelona. Pro diversaj cirkonstancoj ne estas eble efektivigi tion. Tial niaj hispanaj samideanoj proponis aranĝi nian XXVIan en Zaragoza. La ĉefestraro de I.K.U.E. akceptis kaj aprobis tion. Kaj ni estas certaj, ke neniu bedaŭras tion.
Oni jam formis Lokan Kongresan Komitaton:
Prezidanto: d.ro Fernando de la Puente Solsona;
Vic-prezidanto: s-ro Eŭsebio Maynar Duplá;
Kasistino: f-ino Maria Casasnovas Jarreta;
Sekretario: s-ro Alejandro Pedro Marqueta Roy; Avenida de Valencia, 32 ZARAGOZA (Hispanujo).
La provizoraj planitaj datoj estas: 28 julio-2 aŭgusto 1956.
La estraro de I.K.U.E. deziras plenan sukceson, ankaŭ rilate la ĉeeston de multnombraj samideanoj.
En unu el la sekvontaj numeroj de E.K. certe estos aliĝilo kaj ceteraj detaloj baldaŭ sekvos.

L.G.C. de Jong, sekr.o de I.K.U.E.

*

AL NIAJ LEGANTOJ.

Ni bezonas la helpon de vi ĉiuj, por ke la eldono kaj administrado de nia revuo marŝu perfekte. Unualoke ni tial petas vin, pagi kiel eble plej baldaŭ, prefere ankoraŭ en Decembro, vian kotizon por 1956 laŭ indikoj sur la dua paĝo de la kovrilo. Kelkfoje atingas nin plendoj pri la malfrua ricevo de la membrokartoj, sed vi ne forgesu, ke ni povas nur sendi tiujn post kiam ni eksciis ke vi pagis; se la landaj reprezentantoj ricevas la pagon de multaj membroj tre frue, ili povas tuj sendi al nia Administracio la listojn de la pagintoj, kiuj baldaŭ poste ricevos sian membrokarton. Se vi nepre dezirus fini la abonon, sciigu tion tuj: ne estas honeste, ricevi revuon dum pluraj monatoj, aŭ eĉ 1-2 jaroj, kaj nur finfine, post kelkaj admonoj al pago, sciigi ke oni ne plu deziras esti membro, ne pagante la ŝuldon! Ĉiu antaŭ Januaro ne sendas sciigon pri eksiĝo, estas konsiderata kiel membro-abonanto ankaŭ por la venonta jaro kaj kompreneble devas pagi, ĉar nek nia presisto, nek la poŝto laboras senpage!
Por ke nia revuo fariĝu pli ampleksa kaj pli bela, ni bezonas pli multajn membrojn, do ĉiu abonanto klopodu gajni almenaŭ unu novan.
Se en via lando ne ekzistas reprezentanto de IKUE-EK (vidu la liston), pripensu ĉu eble vi ne povus plenumi tiun postenon kaj sciigu tion al ESPERO KATOLIKA, VLEUTEN, Nederlando. Ĉiu reprezentanto ja devas esti centro de propagando, kaj tiam nia membraro certe kreskos.
La estraro de I.K.U.E. kaj la redaktorino de ESPERO KATOLIKA deziras al ĉiuj membroj-abonantoj FELIĈAN KAJ BENITAN KRISTNASKON!

LA TRIA ESPERANTISTA EUKARISTIA MONDKUNVENO — II

La Mondkunveno aranĝis kvar studkunsidojn en la matenoj de la 18a, 19a, 22a kaj 23a de Julio. Ĉiu studkunsido, daŭrinta preskaŭ tri horojn, ĉiam ekkomencis kaj finiĝis per mallongaj preĝoj. Du specoj da temoj estis pritraktataj: la unuaj rilatas al la oficiala temaro de la Kongreso kun la titolo „Kristo Savinto kaj Lia Eŭkaristia Regno", kaj la dua pritraktis diversajn aspektojn de la Katolika Esperanto-Movado. En la kvar kunsidoj ni aŭdis jenajn doktrinajn referatojn: 1) „La Eklezio estas la Eŭkaristia Regno de Kristo Savinto", de Pastro Ludwig Thalmaier (Germanujo); 2) „La Gravaj Eraroj modernaj, teoriaj kaj praktikaj en opozicio kontraŭ la Eklezio kiel Regno Eŭkaristia de Kristo Savinto", de Pastro Gabriel Pausback O. Carm. (Usono; 3) „Devoj kaj rajtoj de la individuo kiel civitano en la eŭkaristia regno de Kristo Savinto", de Pastro Kanoniko Isaias Lagares (Brazilo); 4) Eŭkaristio, nutraĵo kaj kuracilo de la individuo kiel civitano en Lia Regno", de Lia Ekscelenco Mons. José André Coimbra, episkopo de la diocezo de Barra do Pirai (Brazilo); 5) „La pozicio kaj la misio de la kristana familio kiel societo en la Eŭkaristia Regno de Kristo", de Pastro Modesto Carolfi O.F.M. (Italujo); 6) „Aktualaj eraroj, teoriaj kaj praktikaj, koncernantaj la familion, kaj iliaj rebatoj sur ĝia pozicio kaj misio en la eŭkaristia regno de Kristo", de Frato Bertino Goerner, (Brazilo); 7) „La Socio laŭ ĝia koncepto kaj ĝiaj ĉiuspecaj funkcioj en la eŭkaristia regno de Kristo", de pastro Francisko de Barros Leal S.J. (Brazilo) 8) „Eŭkaristio, fonto de ĉiu bono socia, homa, universala, nacia kaj idividua en sia regno", de Pastro Antonio Borges S.J.

Ni multe bedaŭris ke mankis al ni sufiĉa tempo por aŭdi ankaŭ tri doktrinajn referatojn nome: 1) „La intensa vivo eŭkaristia, rimedo por multigi la sacerdotajn alvokojn", de Pastro H.G. Wannemakers S.J. (Nederlando); 2) „Eraroj nuntempaj, teoriaj kaj praktikaj, en siaj rebatoj sur la individuo kiel civitano en la eŭkaristia regno de Kristo", de Pastro Jean Vernoux, S.C.J. (Francujo); kaj 3) „Eukaristio kaj la savo de la homaro", de Pastro A. Beckers, prezidanto de IKUE (Belgujo). Mi devas mencii ke la „Radio Jornal do Brazil" disaŭdigis nian trian studkunsidon. Pri la Katolika Esperanto-movado, ni havis vere grandan plezuron aŭdi jenajn interesplenajn kaj tre trafajn paroladojn: 1) „Esperanto kaj Katolikismo" de Dro. Mário Riter Nunez (Niteroi); 2) „Esperanto en la servo de nia sankta religio", de Profesoro petro Real (Paraná, Brazilo); 3) „Katolika Esperanto-movado en la Tuta Mondo," de Dro. W. Solzbacher (Usono); 4) „Kiel ni povas disvastigi Esperanton en la katolikaj rondoj, precipe inter la katolikaj virinoj?" de F-ino Lourdinha Galväo Cordeiro (Recife, Brazilo); 5) „Kiel ni povas disvastigi Esperanton inter la katolikoj en Brazilo?" de Sro Giovan ni Faroco (Florianopolis, Brazilo); 6) „Kiel ni povas uzi Esperanton por la utilo de nia Eklezio?" de Dro. Luis de Azeredo Coutinho (Belo Horizonte, Brazilo); 7) „Ĉu ni bezonas unuiĝon de Esperantistoj Katolikaj por faciligi la propagandon de Esperanto en Brazilo?" de Profesoro Eŭklides da Silva Carneiro (Rio de Janeiro.)

Oni povas konstati ke la kultura nivelo de niaj studkunsidoj estis tre alta. Tiel la doktrinaj referatoj kiel la pri-esperantaj paroladoj estis zorgeme preparataj laŭ doktrina kaj lingva vidpunktoj.

La spirita bezono de la kunvenantoj estis ankaŭ prizorgata. Laŭ nia unua programo, devis okazi ses mesoj specialaj por Esperantistoj-Pilgrimantoj; sed por plifaciligi la partoprenon de ĉiuj en la solenaj ceremonioj de la Kongreso, ni reduktis ilin duone, sekve nur tri Mesoj specialaj por nia Mondkunveno okazis en la preĝejo de Sankta Antono, en la matenoj de la 18a, 20a kaj 24a de Julio. Dum tiuj mesoj,

ni preĝis kaj kantis en Esperanto. Pastro Kanoniko I. Lagares eksplikis la unuan meson Esperante kaj Portugale. Lia Episkopa Moŝto Mons. José André Coimbra celebris la duan Meson, dum Pastro Antonio Borges S.J. predikis en Esperanto pri la „Eŭkaristio, sakramento de Amo"; kaj la Radiostacio Kontinental je longa kaj mallonga ondoj disaŭdigis tiun Diservon. Mi mem havis la honoron celebri la trian Meson de dankesprimo, kaj mi mallonge predikis Esperante admonante niajn karajn gesamideanojn ke ili estu ĉiam pli fervoraj servantoj kaj adorantoj de Jesuo-Kristo en sankta Eŭkaristio, kaj ke ili restu konstante fidelaj civitanoj en la Eŭkaristia Regno.

Krome, niaj kunvenantoj laŭvole partoprenis la solenajn Pontifikajn Mesojn kaj aliajn ceremoniojn en la placo de la kongreso. Nia grupo denove marŝadis en la lasta solena procesio, portante la Verdan Standardon kaj la du supremenciitajn afiŝojn, kiel ni faris en la procesio de la unua tago de la Kongreso.

La Loka Organiza Komitato havigis al la kongresanoj la „Kulturan Vesperon", kiu okazis je la 20a horo de la 21a de Julio, en la bela salono de la ŝtata kolegio Pedro IIa. Dum du horoj, niaj gesamideanoj, plezure kaj ĝue, aŭskultis la deklamadon de dek literaturaj pecoj, ĉu en verso ĉu en prozo, ĉu originalaj ĉu tradukitaj en Esperanto, kaj dek du religiajn kaj folklorajn kantojn. Jen la literaturaĵoj; „Virina Dediĉo", de anonima verkistino; „Laboru, ne Revu!" de S. W. Smith; „HOMO", de Pastro Dombrowski; „Hejme..!" de Sro Walter Mudrak; „Ĉio Forpasas!" de Pastro Crnica O.F.M.; „Dankkanto al Eternulo", de David, tradukita de Dro Zamenhof; „Kanto de Frato Suno", de Sankta Francisko, tradukita de Pastro Carolfi O.F.M.; „Al mia filino", de Borges de Barros, tradukita de Valdimiro Lorenz; „Salutpoemo al nia III-a E.E.M.K.", de Sro Petro Golobiĉ (Usono); „Pri la prudento en nia agado", el Imitado de Kristo, tradukita de Frato Van Zon. Kaj la listo de la kantoj estas jena: 1) Tagiĝo, 2) Sankta Lucio, 3) Eta Brunkruĉo, 4) Katolika Himno, 5) Pasintaj Tagoj, 6) Por Kristo Reĝo, 7) Paca Nokto, 8) Senmakula, 9) Ho mia lando, 10) Bonan Nokton! 11) Himno de la 36a I.E.K., ka 12) La Espero. La ĥoro de la Esperantista Asocio de Rio-de-Janeiro, gvidata de Profesoro Nilo Borges, kaj la ĥoreto de Profesoro Petro Real alterne kaj lerte realigis la kantadon, kiu provokis entuziasman kaj dankan aplaŭdon de la plena salono. Frato Bertino Goerner, Pastroj Francisco de Barros Leal kaj Antonio Borges S.J., Fraŭlinoj Lourdinha Galväo Cordeiro, Yolanda Evangelista, Margarito Riter Nunes, Profesoroj J.B. Mello e Sousa kaj Eŭklides da Silva Carneiro laŭvice faris la deklamadon kun ĉarmo kaj lerteco. F-ino Olivia Borges ludis la pianon. Profesoro Mello e Sousa direktis la programon. Kaj du radistacioj, nome „Radio Vera Kruz" kaj „Radio Jornal do Brazil" disaŭdigis komplete nian „Kulturan Vesperon", je longa kaj mallonga ondoj. En la originala programo por nia „Kultura Vespero", ni projektis la prezentadon de iu religia dramo kun titolo „Heroo de Eŭkaristio", dramo ĉine verkita de Profesoro Sheng Kun-Pu kaj esperantigita de mi por la uzo de nia Mondkunveno. Bedaŭrinde la manko de taŭgaj ludantoj neebligis la prezentadon.

La III-a E.E.M.K. sendube faris grandegan propagandon por nia kara universala lingvo. Dum ses monatoj antaŭ la kongreso, la gazetoj kaj radistacioj de tiu ĉi ĉefurbo parolis ofte pri nia afero. Du semajnojn antaŭ la Kongreso, la Radistacio de la Ĉefurbestrejo petis famekonatan kantiston Pastron José Mojica O.F.M. kanti la Esperantigitan tekston de la Oficiala Himno de la Kongreso; li fakte kantis, kun la helpo de Esperantista Ĥoro, kaj li parolis favore pri la utileco de Esperanto. Kvin tagojn antaŭ la kongreso, la Radistacio Kontinental disaŭdigis mian dekkvinminutan paroladon en Esperanto pri nia Mondkunveno, je la plej aŭskultata horo

21-22a de la nokto, kaj la Stacio ripetis la disaŭdigon du fojojn dum la Kongreso, ĉar oni registris mian paroladon sur disko, en la momento de la intervjuo. Diversfoje dum la solenaj ceremonioj sur la Kongresplaco, mi devis mallonge paroladi en Esperanto antaŭ la mikrofonoj tie instalitaj por diri mian impreson kaj por saluti la Esperantistojn kiuj ne havis la feliĉon ĉeesti la mirindan okazintaĵon. Kaj la 20an de Julio, je la oka horo vespera, la Radistacio Guanabara dissendis mian intervjuon de tridek minutoj en Portugala lingvo pri la religia situacio en Ĉinujo kaj pri nia III-a E.E.M.K. Ĉiutage, dum tuta la Kongresa semajno, la gazetoj kaj la radistacioj senĉese publikigis kaj disaŭdigis la programon de la Kongreso, kiu enhavas ankaŭ la nian; pro tio, oni senĉese aŭdis kaj legis la novaĵojn de nia Mondkunveno. Ankaŭ la altparolantilo de la Kongresplaco, anoncante la programon de la sekvantaj tagoj, ĉiam sciigis pri nia aparta programo. La vorto „Esperantista" fariĝis tre familiara por la tuta Kongreso.
Supre mi menciis pri nia „Esperantista Saluto" al la I.E. Kongreso. Kvankam mi ne deziris aperi tro-publike dum la Kongreso, mi tamen prenis la taskon adresi tiun saluton. Tio okazis dum la dua solena kunsido. La kongresplaco estis plenplena de nekalkulebla popolamaso kun ĉeesto de tricent Episkopoj kaj dudek Kardinaloj. Post la kantado de Apostola Kredo, post la omaĝo farita al kvar persekutataj Kardinaloj kaj post salutparoladoj faritaj en Nederlanda kaj Angla lingvo, mi ekparoladis en Esperanto. Mia elparolado estis laŭta, malrapida sed tre klara. Mi povis aŭdi ĉiun vorton de mia parolado resonantan en la ekstremaj anguloj de la placo. Silente kaj religie aŭskultis la tuta amaso, ĉar mia parolado estis novaĵo por la plimulto de la ĉeestantaro. Je la fino de miaj salutvortoj, oni tre simpatie aplaŭdis. Kiam mi diris la lastan frazon de mia parolado, mi aŭdis naŭ batojn de la granda horloĝo ĉe Mesbla Turo, kiu staras proksime de la kongresejo. Al mi ŝajnas ke mi uzis ses aŭ sep minutojn por adresi nian „Esperantistan Saluton", kiun aŭskultis multaj samideanoj kaj neesperantistoj per radiaparatoj kaj televidiloj. La sekvantan tagon, diversaj gazetoj publikis la tradukon de mia parolado, kaj la gazetagentejoj kiel „United Press" menciis ĝin en siaj sciigoj. Rilate al la enhavo de l' Salutparolado, mi esprimis tri ĉefajn ideojn, dirante ke ni Esperantistoj multe ĝojas pro nia partopreno en tiu grandioza Kongreso, kiu ebligas nin uzi nian karan lingvon por kanti la gloron de nia Savinto Jesuo-Kristo en la Sankta Eŭkaristio, kaj ni esperas kaj fervore deziras ke niaj Katolikaj fratoj estu konvinkitaj pri la utileco kaj neceseco de la universala helplingvo por la disvastigo de la sankta Evangelio, kaj por faciligi la internaciajn kunvenojn de niaj diverslandaj samkredanoj, kiel la nunan Kongreson, kaj fine, en la nomo de la Esperantistoj de la tuta mondo, mi respektplene salutis la Kongreson kaj tutspeciale, en la persono de la Pontifika Legato, la Sanktan Patron, Papon Pion Dekduan, la Vikarion de Kristo sur la tero. Verŝajne, unuan fojon, iu Esperanta parolado estis farita antaŭ tiom multaj personoj. Tiu ĉi fakto ĝojigis la tutan ĉestantaron de nia Mondkunveno, kaj ĉiuj kredas ke nia „Esperantista Saluto" faris la plej efikan propagandon por nia movado.
La III-a EEMK finis la lastan studkunsidon je la tagmezo de la 23a de Julio, Sabato. Sed posttagmeze, je la 16a kaj 19a horoj, sinsekve la Brazila Esperanto-Ligo kaj la Esperantista Asocio de Rio-de-Janeiro kune kun la Kultura Kooperativo preparis festenojn por ricevi la gesamideanojn kiuj partoprenas en la Eŭkaristia Kongreso kaj nia Mondkunveno. Ili regalis nin per bongustaj manĝaĵoj kaj per dolĉaj trinkaĵoj. Ni kune pasigis kelkajn horojn tre agrablajn inter niaj Brazilaj samideanoj kaj samcelanoj. Ni neniam forgesos ilian bonkorecon. Sed ili surprizigis min per kortuŝiga donaco, kiu konsistas el du belaj volumoj de nia literaturo, nome „Fundamenta Krestomatio" de la 17-a eldono, kaj „Fabiola" de la dua eldono.

Interne de la kovrilo de la F. Krestomatio, la Ligo skribis jenan afablan dediĉon: „Al la eminenta samideano Pastro Johano B. Kao, kun kora danko de la Brazilaj Esperantistoj pro la granda laboro farita de li por la Movado en la III-a E.E. Mondkunveno, 23-7-55"; kaj sur la volumo de „Fabiola" la Esperantista Asocio kaj la Kultura Kooperative jene dediĉas: „Al la eminenta Moŝto Pastro Johano B. Kao O.F.M., kun sincera esprimo de estimo kaj admiro tutkore ni donacas tiun-ĉi memoraĵon, 23-7-55". Post la dediĉaj vortoj, sekvas multnombraj subskriboj de niaj karaj gesamideanoj. En la nomo de la Ligo, meze de multnombraj ĉeestantoj, Profesoro J. B. Mello e Sousa prezentis la donacon al mi kaj faris bonvoleman paroladon rilate al mia laboro por organizi nian Mondkunvenon. Ĉio tio profunde kortuŝis min. Mi ekparolis kaj mi elkore dankis niajn Brazilajn samideanojn pro ilia granda ĝentileco kaj valora donaco, kaj mi asertis ke estas mia devo labori, laŭ mia modesta forto, por nia movado dum la I. E. Kongreso, kaj ke la bonaj efektoj kaj fruktoj de la III-a EEMK rezultis el Dia beno kaj el la sindonema kunlaboro de la membroj de la Loka Organiza Komitato kaj de multaj aliaj gesamideanoj brazilaj kaj fremdlandaj. Verdire, por mi la konstanta laboro farita dum pli ol unu jaro por prizorgi nian III-an E.E.M.K. ne nur ne kaŭzis al mi iun ajn penon aŭ doloron, sed kontraŭe ĝi donis al mi multan ĝojon kaj konsolon. Hodiaŭ mi tutspeciale ĝojas, ĉar mi povas vidi, en la tridekjara datreveno de mia Esperantistiĝo, la bonajn rezultatojn de miaj modestaj klopodoj por disvastigi Esperanton, ĉi-foje per starigo de la III-a E.E.M.K. Nun por konkludi, mi nur deziras konsili al ĉiuj Esperantistoj, precipe la Katolikaj, ke ili interesiĝu pri la movado de la E.E.M.K. kaj nepre klopodu starigi ĝin en la venontaj Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj. Memoru, karaj fratoj, memoru ke la sindonema kunlaboro de ĉiuj certe, certege produktos pligrandajn, centoble pligrandajn fruktojn.

D-ro J. B. Kao O.F.M.

*

ESPERANTO ANTAŬ LA EŬROPA KONSILANTARO.

Komence de la aŭtuna sesio de la Eŭropa Konsulta Asembleo niaj s-anoj Dr. Herrmann, Lampertheim/Germanujo, L. Laurat, Parizo, kaj P. Petit, Rosny-sous-Bois, ambaŭ el Francujo, estis en Strasburgo kaj sukcesis ricevi la subskribojn de 14 delegitoj el Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Norvegujo sub propono de nova rekomendo pri la lingvo-problemo. Por ke la Eŭropa Konsilantaro povu ekzameni, ĉu Esperanto eble donos elvojon el la lingvaj malfacilaĵoj, oni proponas kiel eksperimenton la oficialan instruadon de Esperanto en po unu klaso kun lernantoj de 11 ĝis 14 jaraj en Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando. Post unu jaro de studado la lernantoj estu ekzamenataj en Strasburgo. La 25an de oktobro konsiderinte la aferon la Konsulta Asembleo decidis sendi la proponon al la kompetenta Komitato por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj por prepara pritraktado. La Konsulta Asembleo verŝajne jam dum la maja sesio 1956 definitive decidos pri la rekomendo. Ni esperos, ke estos eble dum tiu sesio montri ankaŭ la faman Esperanto-Ekspozicion de Montevideo en Strasburgo. Pri la plua evoluo de tiu tre grava afero la esperantista publiko ĝustatempe ricevos la necesajn informojn. Ni urĝe petas niajn gesamideanojn, ke ili ne ĝenu iun ajn oficialan instancon aŭ personon sen komisio de la Ĝenerala Sekretario de UEA, d-ro Lapenna aŭ de la gvidanto de la Eŭropa Kampanjo, d-ro Herrmann en Lampertheim/Germanujo.

*

Nova Vivo.

Estas bela aŭtuna tago; la suno brilas belege, karesante junan virinon, kiu sidas antaŭ fenestro kun infaneto sur la sino. Meditante ŝi rigardas la falantajn arbfoliojn, kiuj memorigas al simila tago, antaŭ 11 jaroj, kiam ŝi ankaŭ sidis ĉe fenestro, malproksime de ĉi tie, en sia mezeŭropa patrujo. Ankaŭ tiam ŝi rigardis, kun infaneto sursine, la falintajn foliojn, pelataj de ludema venteto; malgaja ŝi estis pro la foresto de la edzo, pri kiu ŝi jam en pli ol jaro ne estis ricevinta sciigojn. Subite ŝi ekvidas soldaton, eligas ĝojkrion! Jes, vere, estas Karlo, kiu revenas el la milito, post longa kuŝado en hospitalo, sen iu ajn kontakto kun la patrujo. Post resaniĝo li sukcesis atingi en kelkaj monatoj, kun grandaj danĝeroj kaj multaj aventuroj, sian hejmon. Ĝoje li ĉirkaŭbrakas la edzinon, transprenas kaj kisas la infanon sian filon, kiun li ankoraŭ ne estis vidinta!
Sed nun la milito certe baldaŭ finiĝos kaj li povos daŭrigi sian brile komenciĝintan, pro la militservo subite rompitan karieron de advokato. Oni ne plu revokis lin al la armeo, la situo ja estis tiel ĥaosa ke oni evidente ne plu pensas pri li!
Sed ili tute trankviliĝis nur post pluraj monatoj, kiam la milito definitive finiĝis. Tamen ne longe daŭris la feliĉo: baldaŭ ili estis forpelataj el sia patrujo, kies nova registaro decidis ke parto de la loĝantaro apartenas al alia lando. Ĉu ili kulpas, ke la patrujo pro politikaj okazintaĵoj laŭvice apartenas al unu aŭ alia lando, alterne estas memstara? Sed nenio estas farebla: ili devas postlasi sian domon, meblaron kaj banksaldon, rajtas kunporti nur manbagaĵon kaj iom da mono, kaj en ŝarĝvagonoj esta transportataj kiel brutaro de unu loko al alia, ĝis finfine ili atingis la destinon: barakaron en Germanujo.
Tremante Marta pensas pri la mizera tiea vivo sen iu komforto, eĉ sen la plej necesaj aferoj. Pajlofasko estis ilia kuŝejo, meblojn Karlo mem iom post iom fabrikis el krudaj lignopecoj. Terura afero estis la miloj da cimoj kaj puloj, kiujn ili neniam sukcesis daŭre forpeli: post streĉa laboro dum tuta tago la insektoj ŝajnis esti neniigitaj, sed vespere ili revenis milope, ŝajne milionoj da ili, laŭ la planko, laŭ la tegmento, el ĉiuj truoj kaj anguloj!
Ankaŭ ĉiu familia intimeco mankis: en la barako loĝis dekoj da familioj, ĉiuj en la plej granda mizero, oni ne povis ion fari, nek paroli vorton, sen atestantoj; multaj homoj baldaŭ tiamaniere malmoraliĝis, ke ili senhonte faris la plej intimajn agojn en ĉeesto de ĉiuj, eĉ infanoj. Multaj familioj klopodis reakiri ioman intimecon, apartigante siajn kelkajn kvadratmetrojn pere de ĉifonaj kurtenoj, de kartonaj aŭ eĉ lignaj tabuloj, sed tio neniel helpis kontraŭ la kvereloj, la blasfemoj, la krudaj vortoj, la rikanoj kaj dumnoktaj sonaĉoj. Karlo klopodis, plurfoje ankaŭ sukcesis, labori kaj gajni iom dumtage en ĉiuspecaj okupoj, sed Marta devis resti „hejme" pro la eta Paŭlo kaj ankaŭ ĉar ŝi atendis novan infanon, kiu naskiĝis post kvarmonata restado en la barako, nigrokula filineto Ludmila.
Nur relative malmultaj familioj sukcesis akiri parton de loĝejo en Germanujo mem, kie ne nur jam mankas la loĝejoj por la propra loĝantaro, sed ankaŭ la lando estas plenplenega de milionoj da rifuĝintoj.
De tempo al tempo venis reprezentantoj de diversaj landoj, por elekti junajn virojn, kiuj emas labori en minoj kaj fabrikoj. Ankaŭ Karlo ĉiam prezentis sin, sed vane: oni bezonas laboristojn, ne intelektulojn, kaj liaj plej seriozaj asertoj, ke li, forta kaj sana, volonte plenumos ĉian taskon, ne helpas. Ili amikiĝis kun deca laborista familio, iliaj viĉinoj en la barako, kies ĉefo, granda, forta viro, ĉiufoje estis elektata, sed neniam povis akcepti ĉar la koncerna lando ne volis allasi ankaŭ lian maljunan patrinon, kaj ili nepre rifuzis postlasi ŝin.

Tiel pasis la jaroj, sen konsolo, sen espero al pli bona vivo; en granda teruro pro la korpa kaj anima sano de la infanoj. En la tute protestanta regiono ankaŭ ne ekzistis katolika preĝejo; de tempo al tempo iu vagadanta „tornistro-sacerdoto", mem rifuĝinto, venis por celebri la S. Meson kaj disdoni la Sakramentojn. En la lastaj jaroj regule venis unu el la belaj „kapelveturiloj" kiujn disponigis la belgaj kaj nederlandaj katolikoj por tiu moderna apostolado, kaj la du sacerdotoj-ŝoforoj laboris dum kelkaj tagoj inter la barakanoj, disdonante ne nur la riĉajn spiritajn rimedojn, sed ankaŭ vestojn, manĝaĵojn, medikamentojn, frandaĵojn kaj ludilojn por la infanoj.

La lasta Kristnasko estis speciale konsola, ĉar la „Veturilo de Dio" denove vizitis ilin dum kelkaj tagoj kaj oni havis almenaŭ palan rebrilon de la iamaj Kristnask-festoj en la patrujo. La festotagon mem naskiĝis la tria infano, Johano, kaj tuj povis esti solene baptata kune kun kelkaj aliaj infanetoj naskiĝintaj en la lastaj semajnoj. Malgraŭ la mizero regis feliĉo en ilia rondeto!

En la pasinta somero nova espero revivigis la korojn; oni eksciis ke laŭ propono de iu nederlanda urbestro provizore 250 rifuĝintaj familioj estos allasataj en Nederlando; la viroj ricevos dum tri monatoj meti-instruon, ĉar poste ili laboros en la dom-konstruado, kiu bezonas multajn laboristojn. Kia bonŝanco: ankaŭ Karlo estis elektata, same kiel la najbaro, kiu povis ĉi-foje akcepti, ĉar la avineto rajtas resti kun la siaj.

Kaj nun ili jam depost kelkaj semajnoj troviĝas en la nova patrujo: la unua grupo de kelkdek familioj el multaj landoj, de diversaj religioj kaj sociaj rangoj. Ili estis bonvenigataj de afablaj altranguloj, kiuj disdonis ludilojn al la infanoj. La unuajn tri monatojn, dum kiuj ĉiuj estas instruataj en la nederlanda lingvo, la vivmaniero, mastrumaj aferoj, ktp. ili pasigos en barakaro, sed kia diferenco kun la antaŭa! Nun ĉiu familio havas apartan lignan dometon kun kuirejo kaj dormejoj, simple sed plaĉe meblitan, kun pordoj kaj fenestroj kaj moderna komforto. Komence de la venonta jaro ĉiuj okupos veran loĝejon en diversaj urboj, tamen tiel ke en ĉiu urbo ekloĝos kelkaj familioj kiuj laŭ origino, parenceco, religio aŭ amikeco, prefere restos kune, ĉiuj en apartaj loĝejoj, inter la nederlandanoj, kiuj estas petataj akcepti la eksterlandanojn kiel amikojn kaj helpi ilin por kiel eble plej baldaŭ senti sin hejme. Komitatoj jam laboras por disponigi meblojn kaj tolaĵojn, tiel ke finfine la dumjaraj vagabundoj denove definitive povos enranĝiĝi en la normala vivo, en lando kiu fariĝos ilia nova patrujo.

Denove Kristnasko alproksimiĝas, sed nun ĝi estos vera kaj ĝoja festo, kun la brilanta stelo de la espero, promesante la longe sopiritan novan vivon!

T.D.

LA KATOLIKA ESPERANTO-MOVADO EN LA SERVO DE LA EŬKARISTIA KRISTO - IV

En la sama Kongreso, en kiu fondiĝis IKA en 1920, ankaŭ fondiĝis internacia katolika junulara organizo: Mondjunularo Katolika (MOKA). Ĝi multe laboris por kaj per Esperanto en la katolika junularo inter 1920 kaj 1934. De 1926 ĝis 1934 ĝi publikigis en Esperanto gazeton sub la titolo **La Juna Batalanto,** „internacia organo de la katolika junulara kaj paca movado." En diversaj periodoj, ĝiaj naciaj sekretarioj ankaŭ publikigis gazetojn aŭ bultenojn en germana, franca, angla, hispana, kataluna, dana, norvega, pola kaj ĉina lingvoj, kaj ĉiuj tiuj publikigaĵoj forte propagandis por Esperanto. MOKA ankaŭ propagandis pere de prelegoj, flugfolioj, artikoloj kaj Esperanto-paĝoj en diverslandaj junulargazetoj, specialaj konferencoj kaj regionaj Esperanto-studkunvenoj. En 1933 kaj 1934 la sidejo de MOKA estis en Luksemburgo. La neebleco, transpagi abonojn el pluraj landoj, kaj la diktatoraj reĝimoj en diversaj landoj malebligis daŭrigon de la laboro. Sed multaj el tiuj, kiuj iam varbis por Esperanto kaj partoprenis en internacia katolika agado en la rangoj de Mondjunularo Katolika, ĝis nun daŭrigas similan laboron en aliaj formoj. La malnova IKUE — nun jam pli ol 45-jara ! — kaj ĝia revuo **Espero Katolika** — 52-jara kaj la plej aĝa el ĉiuj nun aperantaj Esperanto-gazetoj — daŭrigis sian celkonscian laboron persiste kaj nelacigeble. Ili pasis tra periodoj de triumfo kaj sukceso, sed ankaŭ tra krizoj kaj danĝeroj. Dank' al la pioniroj en multaj landoj, ĉefe en Nederlando, la katolika Esperanto-movado estas vigla kaj forta, preta al novaj taskoj kaj laboroj.

Mi menciu nur kelkajn aliajn faktojn pri la katolika Esperanto-movado. La Internacia Katolika Informejo en Nederlando de multaj jaroj dissendas informojn pri la katolika religio al nekatolikoj, per leteroj, per sia regula bulteno **Vojo-Vero-Vivo** kaj per broŝuroj kaj libroj, kaj jam konvertis diverslandanojn al la katolika kredo. La katolika Esperanto-literaturo estas riĉenhava. **La Imitado de Kristo** de Thomas a Kempis, **la Spiritaj Ekzercoj** de Sankta Ignacio de Loyola, la **Pia Versaro** de Sankto Alfonso Maria de Liguori, la **Floretoj** de Sankta Francisko de Assisi, la **Historio de Kristo** de Giovanni Papini, la romano **Fabiola** de Kardinalo Wiseman estas kelkaj el multaj libroj jam ekzistantaj en nia lingvo.

Inter la sendependaj katolikaj Esperanto-gazetoj, kiuj aperis dum la pasinta duonjarcento, estu menciataj **Katolika Vivo,** kun multaj katolikaj informoj, publikigita de Pastro Ramboux en Parizo en 1931 kaj 1932, **Katolika Revuo** publikigita de grekrita katolika pastro en Hungarujo en 1922, kaj **Esperanta Katoliko** aperanta en Japanujo.

Katolikaj Esperantistoj ankaŭ partoprenis en Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj. Jam en 1912, en la Kongreso de Wien, grupo ĉeestis sub verda flago. Dum la Internacia Eŭkaristia Kongreso de Budapest, en 1938, la Unua Esperantista Eŭkaristia Mondkongreso okazis. Ĉefepiskopo Paul Yu-Pin de Nanking, Monsinjoro Ferenc Erdy, el Hungarujo, kaj la Tre Respektinda Pastro Johano Baptisto Kao, O.F.M., el Ĉinujo, estis inter la ĉefaj parolantoj. Poste denove en Barcelona, en 1952, kaj nun, en 1955, en Rio de Janeiro, Esperanto servis kiel lingvo de Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno.

Oni povus longe daŭrigi pritraktadon de mia temo, „La Katolika Esperanto-Movado en la Servo de la Eŭkaristia Kristo". Elektante mian materialon, mi pensis, ke estus plej utile, revivigi kelkajn faktojn memorindajn, sed ne ĝenerale konatajn. En 65-jara historio Esperanto pruvis sian taŭgecon kaj utilecon por katolikaj celoj. Multaj sindonaj viroj kaj virinoj didiĉis grandan parton de sia vivlaboro al la ka-

tolika Esperanto-movado. Kelkaj eĉ oferis sian vivon: Pastro Font Giralt en Hispanujo, kiu glore servis kiel Prezidanto de IKUE kaj Redaktoro de **Espero Katolika,** estas mortigita de kontraŭreligiuloj en la Hispana Revolucio en 1936. Pastron Metzger, kiu estis unu el la fondintoj de IKA, de **Blanka Kruco** kaj de **Katolika Mondo,** kruele ekzekutis la Nazi-tiranoj en 1944. Ni neniam forgesu ilin !

Ni ankaŭ vivtenu la memoron pri aliaj pioniroj de la katolika Esperanto-movado: pri la Sankta Papo Pio X-a, pri Episkopo Zerr kaj Episkopo Bandurski kaj Episkopo Majláth, pri Monsinjoro Dombrovski kaj Monsinjoro Giesswein, pri Pastro Solis, Pastro Peltier kaj Pastro Coll, Pastro Meŝtan, Pastro Weidner kaj Pastro Bianchini, pri Frato Wigbertus van Zon, pri Claudius Colas, Marie Larroche, P.A. Schendeler, Walther Knopf, kaj multaj, multaj aliaj!

Ni redediĉu nin al la tasko, uzi ĉiujn ilojn por triumfigi la Eŭkaristian Regnon de Kristo, ĉiujn ilojn, do ankau la lingvon Esperanto, pri kiu ni scias, ke ĝi taŭgas kiel ligilo tutmonda en la servo de la katolika vero, de la kristana espero kaj de la Dia Amo!

Fino. D-ro W. Solzbacher.

*

HO DIPATRINO...

Ho Dipatrino en ĉiela spac',
grandas sufero kora,
mian animon venu via grac'
savi de prem' dolora,
manprenu koron sur misvoja lim',
benon kompatan donu al anim'.
Maria, Maria, Maria,

Venu kun mi tra hejma region'
kun bonodoro flora,
min akompanu el gepatra dom',
gvidu tra l' mondo fora,
am-bril' Vi estu en animmalhel',
estu en tuta viv' por mi model'.
Maria, Maria, Maria.

Venu tra mia kara patroland',
Vin rememoras tie
jarcentojn laŭda de l' fidelaj kant',
preĝoj Vin celas pie.
Al Vi kun amo turnas sin popol',
koroj kredantaj venas por konsol'.
Maria, Maria, Maria.

Venu en horo, kiam fuĝas viv',
triston el koroj prenu,
redonu amon, kiun rompis rif',
preĝvokon mian benu,
helpu malsanajn grace en sufer',
ben' Via akompanu nin sur ter'.
Maria, Maria, Maria,

Savu la mortajn de turmento-flam',
aŭdu al pet' ardega,
havas kompaton Via pura am'
kun la animo peka.
Miajn doloron, petojn konas Vi,
ne vanos mia preĝ' al Vi kaj Di',
Maria, Maria, Maria.

Florbrilo blanka ravas en girland'
super sanktejo Via,
en tuta mond', en ĉiu fora land',
Sankta Patrino Dia,
batas amplene koroj en fidel'
por Vi, reĝino virga de l' ĉiel'.
Maria, Maria, Maria,

Josef Julinek.

El ĉeĥa lingvo esperantigis Jirí Korínek.

*

ESTAS LA ALTA CELO DE LA IKI
LA VOJON, VERON, VIVON KOMUNIKI.

Filatelio.

Novaĵoj por nia kolekto „Religio".

VATIKANO: serio okaze de la 500a datreveno de l'morto de beata Fra Anĝeliko. 50 L. roze-karmina, 100 L. blua: Sankta Papo Siksto konsekras Sanktan Lorencon diakono, laŭ fresko de la dominikana monaĥo Fra Anĝeliko, en la vatikana kapelo de Papo Nikolao V-a.

ITALUJO: 1-7-1955 - 1 p.m. 25 L. sepikolora: portreto de Antono Rosmini Serbati (1797-1855), kiu mortis antaŭ 100 jaroj. Li estis pastro kaj filozofo. Li fondis la Kongregacion „Instituto de la Karito".

PARAGVAJO: Okaze de la pastra jubileo de monsinjoro Rodriguez, episkopo de Asunción tiu ĉi lando eldonis serion kiu konsistas el 15 p.m., inter kiuj 3 aerpoŝtaj. Tiutempe Paragvajo estis fondata de la Jesuitoj kiel kolonio. Memore de tiu fakto la markoj de tiu ĉi serio montras la diversajn fonditaĵojn (ofte nur restis la ruinoj). La valoroj estas:
5 ct. okra (afrankmarko), 2 gr. helblua kaj 10 gr. roza (aermarkoj): Turo de Trinidad;
20 ct. bruna (afrankmarko), 3 gr. bruna (aermarko): akvokondukilo de Trinidad;
50 ct. brunruĝa (afrankmarko), 4 gr. helverda (aermarko): Kapelo de l' Sankta Virgulino;
2 gr. 50 flava (afrankmarko), 6 gr. bruna (aermarko): Turo de Sta. Rosa;
5 gr. bruna (afrankmarko), 10 gr. roza (aermarko): Portalo de Sta. Kosmo;
15 gr. verda (afrankmarko), 20 gr. bruna (aermarko): Katedralo de Jesuo;
25 gr. verda (afrankmarko), 30 gr. verda (aermarko): Niĉo de la preĝejo de Trinidad;
50 gr. helblua (aermarko): Sakristio de la preĝejo de Trinidad.

KOLOMBIO: Okaze de la 3-a centjarfesto de la Kolegio de Dipatrino de la Rozario en Bogota aperis krom la serio, priskribita en E.K. no. 446 de aprilo 1955, 2 folietoj. La surskribo tekstas:
„Homenaje al Colegia Mayor de Nuestra Senora del Rosario Alma Mater de la Patria en el III Centenario de su Fundación."

BRAZILO: En E.K. de oktobro 1955 mi menciis la p.m., eldonitajn okaze de la XXVI-a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Rio de Janeiro. Ne estis la XXVI-a tamen la XXXVI-a Kongreso.

Krom la p.m. eldonitaj okaze de tiu Kongreso antaŭe aperis p.m. je Eŭkaristiaj Kongresoj en:

Irlando (1932), XXXI-a Kongreso,
Argentino (1934) XXXII-a Kongreso,
Filipinoj (1937) XXXIII-a Kongreso,
Hungarujo (1938) XXXIV-a Kongreso,
Hispanujo (1952) XXXV-a Kongreso.

J. S. Jansen.

ALVOKO

Okaze de la 26a I.K.K.E. en Zaragoza (Hispanujo) mi estas preta gvidi karavanon kaj aranĝi rondvojaĝon. Ŝajnas al mi ke tio povas esti internacia karavano de nederlandanoj, belgoj kaj germanoj. Ni planas vojaĝon de 14 tagoj.
Mi petas ke tiuj, kiuj intencas partopreni al la vojaĝo sin turnu kiel eble plej baldaŭ al mia adreso por havi supervidon pri la eblecoj.

L. G. C. de Jong, Utr.weg 81, VLEUTEN (Ned.o)

Recenzoj.

Kontralte de MARJORIE BOULTON. Originala poemaro kun portreto de la aŭtorino kaj antaŭparolo de William Auld. 288 pĝ. 16 x 22,5 cm. Prezo f 6,85. Eld. J. Régulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955. — Jen jam la 5a libro de la STAFETO-serio kaj eĉ tre speciala verko: poemaro de mirinde lerta Esperantistino, kiu certe meritas lokon inter niaj plej eminentaj poetoj. Oni apenaŭ povas kredi ke la aŭtorino esperantiĝis nur en 1949! La libro prezentas 200 poemojn pri plej variaj temoj en 7 grupoj; f-ino Boulton prikantas sian laboron kiel direktorino de porknabina mastrumlernejo; prezentas poemojn pri homoj kaj bestoj, pri amo kaj Hiroŝimo, pri famaj E-istoj ktp. ktp. Kelkaj estas tre longaj, formas serion; aliaj koncizaj kaj trafaj, veraj juveletoj. Pro la enhavo de kelkaj poemoj ni juĝas prudente rezervi la verkon al spirite maturaj legantoj.
Ni kore gratulas la poetinon kaj la eldoniston, ankaŭ la tutan E-istaron pro la nova pliriĉiĝo de nia literaturo. — T.D. x

Gauche la 'ĉelisto el la Originalo de MIYAZAWA-KENZI. Eld. Japana Esp. Librokooperativo, Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku, Osaka, Japanujo. 44 pĝ. kun 3 fotoj. Prezo 4 resp. kup.-lo tute nova: Scenaro en kvin bobenoj de ĉarma pupteatra kolorfilmo, produktita de Mitui Arto-Produkcio. La ĉefan rolon plenumas Gauche, muelisto-violonĉelisto, kies ludo, malperfekta sed pro la multa ekzercado ĉiam pli bona, tre kontentigas ĉiuspecajn bestojn, kiuj venas al li por serĉi kuracon de siaj diversaj malsanoj pere de la muziko. La lingvo estas bona, la aspekto de la libreto plaĉa. — T.D.

La Espero de D-ro L. L. ZAMENHOF. Teksto kun muziknotoj sur bonkvalita poŝtkarto. Eld. „La Estonto Estas Nia", Amserdam. Prezo f 0,06

Bulteno de la INTERNACIA GEOGRAFA ASOCIO fondita dum la lasta Bolonja Kongreso. Unuiĝo de profesiaj kaj amatoraj geografoj, etnologoj, antropologoj, arĥeologoj, montgrimpantoj kaj vojaĝemuloj. La bulteno aperas laŭbezone, almenaŭ 5-foje en jaro, ĝis ebliĝos la eldono de „Geografia Revuo". Ĉefredaktoro: Tibor Sekelj. Administrantino: Nina Vidervol, Prazakova 12/III.1, Ljubljana, Jugoslavujo, al kiu petu informojn kaj provnumeron. Oni pritraktos la problemon de la geografiaj nomoj en Esp., projektas la eldonon de libroj pri geografiaj temoj, de faka terminaro kaj de kompleta maparo kun esperantaj enskriboj. En rubriko „Tra la Mondo" la unua Bulteno donas interesajn informojn sur tiu speciala tereno. Ni kore bonvenigas tiun gravan fakon kaj deziras grandan sukceson! — T.D. x

Anoncetoj.

La internacia Korespondado PAX CHISTI petas multajn korespondantojn. Skribu al: s-ro **Y. Guillon,** 52 rue de Lorient, **Rennes, Francujo** (Ill & Vilaine). x

P. Cyprian Bassler ofm. Watersleyde 1, **Sittard, Nederlando,** kolektas por instruo de geografio poŝtk. ilustr. geografe interesajn (pejzaĝojn ktp.). Respondos x

Porinstruista studanto petas alsendon de reklamomaterialo gvidfolioj ktp. de diversaj landoj en la tuta mondo por studadi la kutimojn kaj la vivon de eksterlandanoj. S-ro **J. Verdonk,** Kempenlandstr. 4, **'s-Hertogenbosch, Nederlando.** x

Frato René-Jean Marmou, Prieuré Saint-Martin, **La-Houssaye-en-Brie,** Francujo (Seine & Marne), deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun la tuta mondo. x

Kiu volas korespondi poŝtkarte kun lernantinoj (13-15j.) de mastrumlernejo? Skribu al **S-ino A. Sinnema,** Oostdorperweg 88, **Wassenaar, Nederlando.**

S-ro M. G. Dény, 15 ter Bould. Gouvion St. Cyr, **Paris-17e, Francujo,** interŝanĝas uzitajn poŝtmarkojn de ĉiuj landoj.

Verdlanda vokas.

En la listo sur paĝo 36 — marta numero — kaj aldono sur paĝo 119 — nov. — venis la venontaj ŝanĝoj, resp. aldonoj:

Lunde: 23.45-23.57, Hilversum I 402 m. (en 1a kaj 3a kvaronjaro 1956 je Hilversum II, 298 m.!) P kaj M, nur la unuan lundon de ĉiu monato.

Marde: 02.15-02.30 San José (Urugvajo), 192 m. P

Merkrede: 18.55-19.10 Roma 30.90 m. 41.15 m. 50.34 m. P. de Luigi Minnaja.

Vendrede: 02.15-02.30 San José (Urugvajo) 192 m. P.
18.55-19.10 Roma 30.90 m. 41.50 m. 50.34 m. P. de Prof. Vinc. Musella.

Sabate: 09.32-10.00 Rio de Janeiro 30.7 m. K kaj I.

La elsendoj de BERNO okazas je ondlongoj 13.94 (ne 16,87) m. 31.46 m. 48.66 m.

Radio Roma, progr. por Dec. '55: 2) La radio kaj la blinduloj. 7) Jubileo de la Roma Esp. Grupo. 9) Leterkesto kaj bibliografio. 14) Novaĵoj el Italujo. 16) Italaj turismaj urboj: Massa kaj Carrara. 21) Honorigo al Zamenhof. 23) Kristnasko. 28) Romo dum vintro. 30) Finjaro kaj Novjaro.

Informojn pri Esp. radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la geaŭskultantoj al: s-ro S.S. de Jong, Radio-Servo NCKE, Waltaweg 3, TJERKWERD BIJ BOLSWARD, Nederlando.

Ne forgesu danki la radio-stacion post aŭskulto de Esp. programo!

★

Novaj reprezentantoj por ESPERO KATOLIKA:

PORTUGALUJO: s-ro Jaime Silva, Avenida da Igreja 41, 3°-Esq, (Bairro de Alvaladej), LISBOA. Abonprezo 40 esk. jare.

NOV-ZELANDO: s-ro d-ro J. Hamvai, 33 Arran St., Avondale, AUCKLAND. Abonprezo 10 ŝil. jare.

★

Por amuzo.

La parohestro de Ars devis fari teologian ekzamenon ĉe la fino de sia studado, same kiel ĉiu studanto. Ne estante klerulo, li ne povis respondi diversajn, al li ekpafatajn demandojn. Kolera pro tioma nescio la ekzamenanto elkriis:

— Ĉu vi do vere scias nenion? Kian utilon havos tia azeno?

— Ho, profesora moŝto, Samsono sukcesis venki 3000 Filiŝtojn per ununura azena makzelo. Kion tiukaze ja povus fari la bona Dio per tuta azeno?

Promenante kun amiko, Voltaire demetas sian ĉapelon dum preterpasas sacerdoto portante la sanktan Eŭkaristion.

— Ĉu vi repaciĝis kun Dio? — mirigite demandas la amiko.

— Ho, ni salutas nin, sed ne parolas unu kun la alia!

★

KORAN DANKON

al ĉiuj kiuj sendis al mi kondolencojn okaze de la morto de mia Patro. Ne estas eble, skribi al ĉiuj persone, tial bonvolu akcepti ĉi tiun ĝeneralan dankesprimon, kiu tamen validas por ĉiu aparte.

Truus Durenkamp.